

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Tatjana Auderskaja

Marc Cuffez

Mireille Grosjean

Henrik Hillerström

Isikawa Tiekō

Marija Jerković

Dennis Keefe

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Vicente Manzano-Arrondo

Mónika Molnár

Radojica Petrović

Shi Xueqin



**Madrido invitas al la kongresoj
de HEF kaj ILEI, 20-28 julio 2018**

ilei

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Dennis KEEFE: <i>De banalaj bildoj al sukoplenaj silentaj filmoj[...]</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Fariĝu diplomita Esperanto-instruisto!</i>	9
Ilona KOUTNY: <i>50 jaroj da interlingvistiko en universitato [...]</i>	11
Mireille GROSJEAN: <i>Ideala solvo por komplika situacio</i>	15
Mónika MOLNÁR: <i>Freinet-pedagogio – Parto II</i>	17
Tatjana AUDERSKAJA: <i>Ĉu estas facila nia lingvo Esperanto?</i>	21
Vicente MANZANO-ARRONDO: <i>La universitato povas funkcii alimaniere.</i> 23	
El la landoj kaj sekcioj (BE, CN, DE, HU, JP, HR)	25
Henrik HILLERSTRÖM: <i>Pri 499</i>	35
La 51-a ILEI-Kongreso en Madrido 2018 (Radojica PETROVIĆ)	37
ILEI-Kongresoj en 2019 kaj 2020 - konkurso (Radojica PETROVIĆ)	38
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	41

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilna Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolkovrilo: Monumento
al Cervanto (Miguel de
Cervantes) en Madrido

Enkonduko

Saluton, karaj legantoj,

Legante ĉi tiun numeron de nia organo IPR, vi povos konstati, ke ILEI agas kaj reagis al la nova situacio, ke la mondo bezonas Esperanto-instruistojn. Post la ĉefartikolo verkita de Dennis Keefe vi trovos detalan priskribon pri niaj kvin novaj agadoj, inter kiuj tri rilatas al EIT: Esperanto-instruista Trejnado. NEPRE LEGU! NEPRE ALIGU! Ni devas esti pretaj por novaj DEFIOJ.

Pro la altnivela kvalito de nia revuo *Juna Amiko* (plenkolora revuo kun kvar numeroj jare) ni klopodas konigi ĝin kaj trovis strategion por tio: niaj membroj povas fariĝi SUPERA MEMBRO kaj rivevi paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* kun RABATO! Detaloj aperas ĉe www.ilei.info. *Juna Amiko* estas por progresemluloj 10 ĝis 100-jaraĝaj.

La temo de la artikolo de Keefe estas la uzo de silentaj filmoj en la instruado. Aŭdante pri silentaj filmoj, oni pensas pri Charlie Chaplin kompreneble. Li estis elstara artisto, aktoro kaj reĝisoro, sed ne nur. Kreante la filmon *La Diktatoro* en Usono en 1939, li nepre volis, ke la spektanto povu imagi tiun diktatoran katastrofon ie ajn en la mondo. Pro tio li uzis Esperanton en la scenoj de la filmo. Tion oni plej bone vidas en *Chaplin's World* la muzeo pri li en Corsier sur Vevey en Svislando. Charlie Chaplin ankaŭ vizitis nin en Buenos Aires okaze de la UK. Li eĉ propagandis la libreton *Poŝamiko* (vd p.43).

Li sukcesas esti amuza kaj serioza samtempe. Tio povas esti modelo por ni en nia instruado. Ĉu?

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

De banalaj bildoj al sukoplenaj silentaj filmoj en la instruado de Esperanto

Ĉoĉo (Charlie Chaplin) helpas vin lernigi Esperanton!

de Dennis KEEFE, Universitato de Nanjing, Ĉinio

Pri la aŭtoro:



Dennis Keefe estas verkisto de la BEK-Kurso, aŭtoro de la Valencia Metodo, ideinto de Lingvaj Festivaloj, kunfondinto de Esperanto-Insulo kaj estiginto de la Universitato de Esperanto. Li parolas sep lingvojn kaj instruis Esperanton en Hispanio, Usono, Francio, Japanio, Ĉinio kaj Koreio (Liceo de Esperanto, NASK kaj Chautauqua, Grésillon, Plouezek, Oomoto, Universitato de Nankino kaj SEK Seulo Esperanto-Kulturcentro). Profesie li estis merkatikisto ĉe IBM, estro de lampo-fabriko, instruisto pri merkato ĉe HEC Parizo kaj la Universitato de Nankino. Krome li kreis kaj gvidis internaciajn programojn aŭ instruis la anglan lingvon kaj komunikadon ĉe la Universitato de Ilinojso, École Polytechnique en Francio kaj Johns Hopkins-Universitato en Ĉinio.

Resumo:

Kiam kursgvidantoj de Esperanto pensas pri la utiligado de filmoj kiel lernilo aŭ instruilo, ili ofte prikonsideras filmojn kiuj instruas la lingvon (Mazi en Gondolando, Pasporto al la Tuta Mondo), aŭ en kiuj Esperanto rolas kiel aktoro-lingvo (Angoroj, Gerda Malaperis). Tamen, en ĉi tiu artikolo, la aŭtoro argumentas por la utiligado de senŝonaj, silentaj filmoj de la kino-epoko 1895 al 1930, en kiu periodo la filmoj de Charlie Chaplin elstare taŭgas kiel ĉefa filmo-materialo. Li pravigas la uzon de tiaj neparolaj filmoj per pluraj kialoj: plia efikeco por facile kompreni kaj efike paroligi gelernantojn ol en tradicia kurso-materialo; taŭgeco por ĉiunivelaj lernantoj ĉu komencantaj ĉu fluparolantaj; facila kaj senkosta antaŭ-preparo de lecionoj; kaj praktika uzebleco fare de aŭ novaj aŭ spertaj instruistoj.

Multe da kursgvidantoj de fremdlingvaj kursoj ŝatas uzi filmojn de tempo al tempo por helpi instrui. Tiuj filmoj varie kaj bunte apogas la instruadon kaj lernadon. Tamen preskaŭ ĉiam tiuj filmoj estas *parolaj* filmoj. Lingvaj instruistoj ne utiligas senŝonajn, silentajn filmojn. Tamen tiaj filmoj en kiuj neniu voĉo aŭ lingvaĵo aŭdiĝas, kreataj ĉefe inter la jaroj 1895 kaj ĉirkaŭ 1930, povas doni surprize abundan materialon por lingvo-kurso, kaj eĉ novaj instruantoj de Esperanto povas sukcese utiligi ilin.

Por pli bone koncepti la utiligadon de neparolaj filmoj, eblas pensi pri filmo ne kiel kina arto, sed kiel nekredeble alloga kaj efika serio de lerte kunmetitaj bildoj. Bildoj kaj multe da ili. Bildoj kiuj havas sencojn, klarajn signifojn. La kapablo mense enmeti bildon pri lingva nocio povas multe helpi al la lernanto kompreni, enkapigi kaj longdaŭre memori konkretajn konceptojn kiel *pomo*, *ĝirafo* kaj *poŝtelefono*, sed ankaŭ pli abstraktajn kiel *supreniri*, *revi* kaj *kontroli*, ekzemple.

Bildoj vidigas vortojn. Ni faru etan eksperimenton: Diru al mi kiu vorto havas la sekvan signifon?: *Dujara, specife odora herbo kun pivotradiko ligneca kaj blanketa ĉe la sovaĝaj formoj, karna kaj oranĝa ĉe la kultivataj formoj, kultivataj en la tuta mondo por radiko manĝata kruda aŭ kuirita* (el vortaro PIV). Jes ja, kio estas tio? Tutsimple tio estas *karoto*! Kompreneble vi povas ege rapide lernigi tiun vorton per monstro de reala karoto, kaj vi ankaŭ povas tutsimple uzi tradukadon: carrot, carotte, zanahoria, pastagana, wortel ktp (el vortaro PreVO). Sed mi volas paroli pri bildoj kaj filmoj.

Karoto kaj miloj da aliaj vortoj kaj konceptoj povas esti prezentataj en la klasĉambro per diversaj metodoj: instruisto povas montri bildon de karoto, blanka-nigra aŭ kolora. Li povas montri bildon aŭ desegnaĵon aŭ pentraĵon aŭ foton de tiu karoto en la manoj de, ekzemple, infano. Li povas montri plurajn bildojn: en la unua estas la karoto en la mano de knabo; en la dua estas la sama knabo, kiu manĝas la karoton; en la lasta estas la knabo kiu preskaŭ finmanĝis la karoton ktp.

Serĉi kaj trovi bildojn, kiuj estas kaj sencohavaj kaj interesaj, ne estas facila afero. En la pentraĵoj de Arcimboldo vi eble trovos vian serĉatan frukton aŭ legomon, sed vi ne trovos ilin sufiĉe klare desegnitaj por viaj pedagogiaj celoj. Ne estas facile kolekti ĝustajn bildojn speciale por montri kompleksajn ideojn kaj agojn. Se vi serĉas bildojn pri bestoj, vi trovos ilin abunde sur la interreto, sed estos malfacile al vi enmeti tiajn bildojn en koheran allogan skemon: via dazipo estos tro granda; via elefanto estos sur kamparo kun arboj; viaj birdoj ne facile harmonie kongruos kun la aliaj

bestoj. Via prezentado de bestoj ne estos dinamika kaj ĝi similos kolekton de mismetitaj lignopecoj de zigzaga puzzle. Tio ne koheras; tio ne interesas; tio ne allogas; tio ne memorindas. Kaj samtempe tio donos al vi ege longan preparo-laboron.

Similan komenton mi povas doni pri la bildoj, kiujn mi mem desegnas por lernado. Mi prenu miajn simplajn bildojn de la BEK-Kurso, ekzemple. En la unua bildo estas lampo, estas botelo, estas taso, estas tranĉilo ktp. Kion allogan kaj memorindan mi povas diri pri tiaj bildoj? Ege, ege malmulte. Mi povas diri: *Ĉu tio estas lampo? Kio estas tio?* Sed mi ne povas diri multe pli ol tion. Se la bildo enhavas plurajn elementojn, samtempe, mi povas aldoni: *Ĉu la lampo estas super la taso? Aŭ, kie estas la taso?* Se ĝi estas kolora bildo, pluraj alispecaj demandoj eblas kiel: *Ĉu la ruĝa botelo estas sur la tablo, kaj la blua botelo estas sub ĝi?* Ĉiaokaze miaj propraj bildoj, se mi uzos ilin troe, ne plu efikos. Nuraj bildoj povas rapide enuigi.

Sed nun, imagu tiujn samajn ofte preskaŭ sensencajn bildojn de karotoj, ĉevaloj, lampoj kaj tasoj en filmo. Nun ili povas vivi kaj allogi kaj instrui multe pli efike. Anstataŭ *Tio estas lampo*, vi povas imagi la sekvajn starigotajn demandojn, kiuj eblus per nur UNU SEKUNDO de filmodaŭro: *Ĉu Petro malŝaltis la lampon? Ĉu li faris tion por pli bone legi? Ĉu li faris tion kaj poste enlitiĝis? Ĉu li faris tion por esti kun sia koramikino? Kiam li malŝaltis la lampon, kio okazis? Kion li faris antaŭ ol malŝalti la lampon? Ĉu Maria malŝaltis la lampon aŭ ĉu ŝi malŝaltigis ĝin? Ĉu la lampo ŝaltiĝis aŭ malŝaltiĝis? Kie estis Maria, kiam Petro malŝaltis la lampon? Kial Petro volis malŝalti la lampon? Kial li volis, ke ne estu lumo en la ĉambro? Kion Petro faris malŝaltonte la lampon? Kion li faris malŝaltinte la lampon? Ĉu la lampo malŝaltita de Petro estas dekstre aŭ maldekstre de la tablo? Ktp ktp ktp. Kaj kompreneble vi ankaŭ povas starigi ege simplajn demandojn: *Ĉu tio estas lampo?**

En la supraj 15 ekzemploj de demandoj, kiuj eblas per nur ero de sekundo de filmorigardado, ni klare vidas, ke estas facile starigi demandojn por ĉiaj niveloj de lingvoscio. Demandoj por komencantoj: *Ĉu Petro ŝaltis aŭ malŝaltis la lampon?* Aŭ, *Ĉu la lampo estas super Petro?* Demandoj por progresantoj: *Ĉu la lampo, kiun Petro malŝaltis, estas en la dormoĉambro?* Aŭ, *Kio okazis, kiam li malŝaltis la lampon?* Demandoj por pli altnivelaĵ gelernantoj: *Ĉu Petro, malŝaltinte la lampon, tuj enlitiĝis? Kion vi pensas, ke Petro volis fari post kiam li malŝaltis la lampon kaj enlitiĝis?* Tia nivelo-fleksibleco ne ekzistas kun simplaj bildoj.

Ni klare vidas, ke granda avantaĝo de filmoj estas, ke la kursgvidanto povas uzi la saman materialon, la saman filmon por diversnivelaĵoj: tiuj, kiuj ĵus komencis lerni Esperanton; tiuj, kiuj jam parolas la lingvon meznivele; kaj tiuj, kiuj havas altan nivelon de la lingvo. Aliflanke la kursgvidanto ne povas fari simile per bildoj. Bildo de elefanto estas por komencantoj; bildo de la suno estas por komencantoj. Provi uzi tiujn samajn bildojn en altnivela kaj eĉ meznivela kurso estus eraro, laŭ mi. Bildoj ne kongruas kun multnivela uzado; filmo jes ja povas facile kongrui kun diversnivelaĵoj kursoj.

Sed kiaj filmoj pleje taŭgas por efika lingvo-instruado? Se vi estas kiel mi, vi certe neniam imagis, ke la plej bonaj lingvo-lerniloj povus esti filmoj sen lingvo, sen parolado, sen vortoj. Dum miaj tridek jaroj kiel, unue, lingvo-instruisto, kaj poste kiel estro de diversspecaj lingvaj kaj internaciaj programoj, mi neniam pensis pri la pedagogia valoro de silentaj filmoj. Krome en miaj jaroj kiel avida leganto pri lingvo-instruado, lingvo-akirado, lingvo-lernado, mi aŭdis nur pri la uzado de sonaj filmoj – tiuj post la jaro 1930 – kaj neniam aŭdis pri la uzado de silentaj filmoj – tiuj ĉefe inter la jaroj 1895 – 1930. Certe estis ie kaj iam instruistoj, kiuj utiligis tiajn filmojn, sed uzado de silentaj filmoj neniam kernis en la instruado de fremdaj lingvoj, kaj neniam, laŭ mia scio, en la lernigado de Esperanto.

Simile al la avantaĝo utiligi la saman silentan filmon por diversnivelaĵoj lernantoj, eblas ankaŭ, ke tiajn filmojn uzu ĉiaj instruantoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj. Mi klarigos. Ĉiuj el ni kapablas starigi demandojn pri filmo. Se vi vidas la unuan parton de la unua filmo montrata al publiko en 1895, la ĉirkaŭ unuminuta filmo nomata *La Sortie de l'Usine* de la Fratoj Lumières, vi povas facile starigi demandojn pri ĝi, eĉ se vi ne estas profesie trejnita lingvo-instruisto. Mi donos ekzemplojn al vi, sed eble vi volas unue mem spekti tiun filmon en la Interreto, ekzemple, en Jutubo. Serĉu per la titolo supre menciita kaj vi tuj trovos ĝin.

Jes ja, eĉ se vi ne estas sperta instruisto de Esperanto, vi povas montri la unuajn kvin SEKUNDOJN de la filmeto kaj demandi, ekzemple: *Ĉu estas kolora filmo aŭ blanka-nigra filmo? Ĉu la pordoj fermiĝas aŭ malfermiĝas? Ĉu estas nur unu pordo? Ĉu homoj eniras aŭ eliras? Ĉu estas multe da viroj aŭ multe da virinoj? Ĉu estas nur 3 homoj? Kiom da homoj estas? Ĉu ili iras al la laborejo? Ĉu ili eble iras hejmen? Ĉu iu eniras? Ĉu vi vidas katon? Ĉu la virinoj surhavas ĉapelojn? Ĉu ĉiuj? Ĉu kelkaj turnas sin dekstren? Kaj kelkaj maldekstren?* Do, jen, 15 sufiĉe simplaj frazoj kiujn vi, komencanta kursgvidanto, povas fari. Vi nun estas bona kursgvidanto kiu helpas al

novuloj aŭskulti kaj paroli Esperanton. Kaj dume vi montras iom da historio pri kinarto. Gratulon!

Kaj se vi estas sperta instruisto, vi jam scias, ke vi povas ne nur starigi demandojn, vi povas utiligi multe da aliaj instruo-manieroj, ekzemple: vi povas peti al viaj gelernantoj, ke ili mem starigu demandojn, kiam vi haltigas la filmon. Vi povas peti resumon de la filmo parole aŭ skribe. Kiel sperta instruisto, vi jam havas enkaŭ 10 ĝis 100 aliajn rimedojn profiti de la spektado de tiu filmo. Tamen, eĉ la plej bazaj instruantoj povas ĉerpi paroligan valoron de la filmo. Kaj imagu, tiu silenta filmo de la fratoj Lumières estis la unua vidata de publiko, kaj tio en la jaro 1895. Postaj filmoj estas multege pli riĉaj je ideoj, kaj tiuj ideoj donas al vi oble pli da ebloj demandi viajn kursanojn pri ili, kaj pliriĉigi la kurson per ĉiaspecaj kromtaskoj. Do, mi plene rekomendas la utiligadon de silentaj, senŝonaj filmoj por kursoj de Esperanto, en kiuj oni celas plibonigadon de aŭskultado, de parolado kaj de lernado de novaj vortoj, novaj esprimoj. Silentaj filmoj, kiel tiuj de la fama aktoro Charlie CHAPLIN, devas montri ideojn klare. La aktoroj en sia vizaĝo devas esprimoplene montri emociojn. La vortoj ne aŭdiĝas, do estas la agoj, la gestoj, la klara disvolviĝo de la filmo, kiuj devas „diri” la tuton.

Ĉu estas kelkaj silentaj filmoj, kiuj plej uzindas? Mi pensas, ke jes. Mi persone rekomendas la filmojn de Charlie CHAPLIN, kiun mi nomas en miaj BEK-Kursoj „Ĉoĉo”. Mi sukcese utiligis liajn filmojn kun plenkreskuloj de ĉiuj aĝoj en Esperanto-Insulo 2013 (En Esperanto-Insulo 2010 kaj 2012 mi ne havis tiajn filmojn). Mi uzis Ĉoĉo-n ankaŭ kun kelkaj specialaj kursoj de la angla lingvo en Ĉinio. Kaj antaŭ nelonge mi povas diri, ke Ĉoĉo kaj Esperanto furoris en miaj kursoj por helpi prepari koreajn esperantistojn por la Universala Kongreso en Seulo ĉe la Korea Esperanto-Asocio kaj ĉe la Seula Esperanto-Kulturcentro. Kelkaj el tiuj gelernantoj estis en la bazaj niveloj de la KER-sistemo; aliaj en la mezaj kaj ankoraŭ aliaj en la plej altaj niveloj. Tio estas, kiel dirite antaŭe, silentaj filmoj bone funkcias je ĉia nivelo de lingvo-instruado, se la kursgvidanto adaptas sian instruadon al la nivelo de la gelernantoj.

Filmoj de Chaplin inter la jaroj 1916 kaj 1936 (lia lasta silenta filmo) estas abundaj kaj tre altkvalitaj, ĉar en la lastaj du jardekoj multaj el tiuj filmoj estis tre bele kaj profesie renovigitaj. El la filmoj de Ĉoĉo, mi rekomendas filmojn de la jaroj 1916 kaj 1917 kiel *La Enmigrinto*, *La Vagabondo*, kaj *Je la Unua Nokte*, aŭ pli longajn klasikajn filmojn liajn kiel *La Knabo* (1921), *La Oro-Serĉantoj* (1925), *La Cirko* (1928), *Lumoj de la*

Urbo (1931) kaj *Modernaj Tempoj* (1936). Estas sufiĉe da materialo en tiuj filmoj fakte por fari multsemajnan, eĉ multmonatan kurson.

Se vi volas provi uzi neparolajn filmojn en via kurso, mi rekomendas, ke vi komencu per mallongaj eroj de iu filmo por priparolado dum 10 aŭ 15 minutoj. En venonta artikolo mi parolos pli detale pri tio kiel sukcese uzi silentajn filmojn, sed la ĉefa instruo-maniero, la plej simpla, konsistas el 1) montro de peceto de la filmo al la kursanoj kaj 2) haltigo de la filmo kaj 3) starigo de demandoj al la kursanoj. Post kiam vi ne plu havas interesajn aŭ utilajn demandojn pri tiu unua sceno, ripetu la paŝojn 1, 2, kaj 3 kun dua sceno. Do, vi nun havas unu el la plej geniaj filmistoj de la historio de kino-arto – Ĉoĉo – por helpi al vi paroligi viajn gelernantojn. Ĉiuj ŝatas Ĉoĉon, kaj se li ne parolis Esperante, ĉar liaj filmoj estas senvoĉaj, li almenaŭ povas akompani vin en via kurso de Esperanto por ĝoje kaj amuze helpi al viaj kursanoj plibonigi sian komprenon de nia kara Internacia Lingvo. Bonan ŝancon en via „silenta” instruado kune kun la silenta Ĉoĉo!

Fariĝu diplomita Esperanto-instruisto!



En la Ligo blovas vigla vento....

La nuntempa pozitiva evoluo de Esperanto en la mondo, laŭ la ekzemplo de Francio kaj Ĉinio, spronas la Ligon al pli efika laboro en la kampo de lertigado de geinstruistoj kaj diplomado de ili. Pro tio la estraro de ILEI pripensis pri novaj ebloj kaj fieras prezenti al vi hodiaŭ la novaĵojn. Ili fakte estas kvar. Du rilatas rekte al **Esperanto-Instruista Trejnado: EIT**.

RITE kaj Madrido: Tio estas jam survoje ekde oktobro 2017. Temas pri lertigado per la Reto: *Reta Instruista Trejnado de Esperanto* (RITE), programo de www.edukado.net. D-ino Katalin KOVÁTS konsentis meti je dispono parton de tiu vasta programo kaj doni fortan rabaton al la

partoprenantoj. La temoj reduktiĝos al gramatiko kaj metodologio. La partoprenantoj studos rete, faros taskojn, havos individue diskutojn, analizojn kaj korektojn de Katalin KOVÁTS kaj preparos modellecionon, kiun ili prezentos en Madrido okaze de la ILEI-Kongreso en julio 2018. Dekmonata studado malĉeesta sub la gvido de Katalin KOVÁTS, kaj poste intensa kurso, tio estas seminario, dum la ILEI-Kongreso, kaj ekzameno. Kaj finfine akiro de DIPLOMO. Fine de oktobro 2017 jam 7 personoj ekstudis laŭ tiu programo. Estas entute 24 lokoj. Do nepre skuu vian pigrecon kaj aliĝu! Ĉiuj informoj troviĝas en la paĝaro de ILEI: www.ilei.info. Ĉefpaĝo dekstre: Fariĝu diplomita Esperanto-instruisto en Madrido

RITE kaj dufoje Poznań 1.1. – 31.12. 2018: Iom sama programo de EIT estas tiu ĉi. Ĝi daŭros de la 1-a de januaro 2018 ĝis la 31-a de decembro de la sama jaro. La ĉeestaj partoj estos du, unu semajno en februaro (03-10.02.2018) kaj unu semajno fine de septembro (datoj anoncotaj). La partoprenantoj estos en Poznań sammomente kiel la studentoj de la Interlingvistikaj Studoj kaj havos komunajn partojn; internacia fruktodona etoso naskiĝos sendube. La kunlaboro kun edukado.net estos la sama, kiel en la unue prezentita programo RITE kaj MADRIDO. Per tiu alia programo ILEI celas akiri pliajn 24 novajn diplomitajn instruistojn de Esperanto. (*Rimarko:* Povas aspekti malfacile atingi Poznań dufoje dum la jaro. Tamen en Poznań ekzistas malmultekostaj loĝebloj; plie tiu programo povos allogi personojn el orienta Eŭropo.)

Tria novaĵo por la membroj de ILEI: ekde la 1-a de januaro 2018 ili havos **liberan aliron** al la instrumaterialo **de edukado.net**. Tio estas giganta kolekto de pli ol 800 ekzercoj kaj aktivaĵoj por lertiĝi en la lingvo kaj instrui ĝin.

Kvara novaĵo: tiu kvara rilatas al la „juvelo” de ILEI: **la revuo Juna Amiko (JA)**. Skipo laboras por krei belaspektan enhavoriĉan revuon, kiun la abonantoj legas eksciante multon kaj amuzante sin en enigmoj kaj ludoj. La revuo estas plenkolora kaj aperas kvarfoje jare. Temas pri Internacia Esperanto-revuo de ILEI por progresantaj legemuloj inter 10 kaj 100-jaraĝaj. La estraro kaj la redaktoro Stano MARČEK nepre deziras kreskigi la nombron de abonantoj. Por fari tion, la estraro laŭ decido de la Komitato kreis novan membrokategorion: **supera membro**. Tiu ILEI-supera membro havos rabaton en la abono de *Juna Amiko*. Por A-landanoj la kotizo al ILEI estas 20 EŬR kaj la abono al *Juna Amiko* estas 18 EŬR. Do kune 38 EŬR. Ekde 1.1.2018 eblos ricevi paperan IPR kaj paperan JA en la sama koverto pagante nur 32 EŬR. Sama rabato prezentiĝas por B-landanoj kompreneble: nuna membreco 10 EŬR, nuna abono al JA: 13 EŬR. Kune 23 EŬR. Nun tiuj du

revuoj kune kostos 18 EŬR. Ĉiuj precizaj informoj iris al la sekciestroj kaj reprezentantoj kaj troviĝas en la retejo de ILEI www.ilei.info. Ni certas, ke ĉiuj legantoj de ***Juna Amiko*** lertiĝas kaj feliĉas vidante la belaspektajn paĝojn kaj legante la interesajn rakontojn, raportojn, kvizojn kaj bildstriojn. Ni esperas, ke multaj ILEI-membroj uzos tiun novan eblon. Kaj kial ne, ke pliaj esperantistoj membriĝos ĉe ILEI per tiu nova sistemo kaj fariĝos superaj membroj: la Ligo bezonas vian subtenon en tiu ŝanĝiĝema periodo.

Kvina novaĵo: EIT Esperanto-Instruista Trejnado en Afriko por afrikanoj kaj afrikemuloj! Unujara studado per la Reto kadre de la programo RITE de edukado.net kaj unu semajno en Kotonuo, Benino, 4-11 nov. 2018 kun ekzameno, provlecio kaj diplomo por la sukcesintoj! Ĉiuj detaloj troviĝas en la retejo www.ilei.info.

Unujara EIT plus ILEI-Kongreso. **Fariĝu diplomita EO-instruisto!**

Unujara EIT 1.1.-31.12.2018 plus 2 x Poznan. **Fariĝu diplomita EO-instruisto!**

Unujara EIT plus unu semajno en Kotonuo. **Fariĝu diplomita EO-instruisto!**

Favoro por ILEI-membroj: **libera aliro** ĉe www.edukado.net al la valorega kolekto de Instrumaterialoj.

Rabato por ILEI-membroj: ricevu niajn revuojn IPR kaj JA papere pagante malpli, fariĝante **SUPERA MEMBRO**.

Mireille GROSJEAN, Prez. de ILEI

(NdlR: tiu teksto aperas en du revuoj samtempe: Revuo Esperanto kaj IPR)

**50 jaroj da interlingvistiko en universitato,
30 jaroj da persona sperto,
20 jaroj da Interlingvistikaj Studoj**

de Ilona KOUTNY (PL/HU), Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

La kompleksa universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko komenciĝis per la Esperanto-fako de la Eötvös Loránd-Universitato en Budapeŝto en 1966. Fondis ĝin d-ro István SZERDAHELYI, kiu ellaboris la studprogramojn kaj lernolibrojn por la universitata fako, kiun li gvidis ĝis sia morto en 1987. Ni rememoru ankaŭ pri li en tiu ĉi jaro pro la 30a datreveno de lia morto! La gestudentoj krom sia alia fako ricevis diplomon ankaŭ pri Esperanto. Pluraj konataj hungaraj esperantistoj (kiel Zsuzsa BARCSAY pri metodiko, Árpád RÁTKAI pri movadhistorio, Péter

RADOS pri literaturo) kunlaboris kun li en la instruado kaj ankaŭ en la Hungara-Esperanta vortaro (kiu aperis nur post lia morto en la finredakto de Ilona KOUTNY). Pluraj liaj studentoj aktive partoprenas en la Esperantomovado (kiel Zsófia KÓRÓDY, Márta KOVÁCS, István ERTL, Imre SZABÓ, Blazio WACHA). Dank'al la agado de Szerdahelyi ankaŭ la oficiala lerneja instruado de Esperanto kaj la ŝtataj lingvoekzamenoj en Hungario havis universitatan subtenon.

Ankaŭ la verkanto de tiu ĉi teksto studis ĉe Szerdahelyi kaj engaĝiĝis por Esperanto. Ekde 1987 kun Zsuzsa VARGA-HASZONITS (same eksstudentino) mi daŭrigis la laboron de Szerdahelyi en la Esperanto-fako. Krom la lingvo mi instruis Esperantan gramatikon. Krom la tagaj studoj ni fondis en 1991 ankaŭ la internaciajn esperantologiajn studojn, kie diplomiĝis kelkaj eksterlandanoj. Ili servis kiel modelo por la interlingvistikaj studoj de UAM, kie mi daŭrigis mian agadon.

Fondita en 1997 kadre de la Lingvistika Instituto (Fakultato pri Moderna Filologio) de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań) la **postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj** startigis sian unuan grupon en 1998 kaj daŭre ĉiun trian jaron la sekvan. Nun, post 20 jaroj startis la 7a interlingvistika grupo kun 20 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio, Svisio, Germanio, Hispanio, Rusio, Kazakio kaj Pollando). La fondaĵo ESF (*Esperantic Studies Foundation*) jam de 15 jaroj (ekde 2002) disponigas kelkajn stipendiojn por studentoj, kio ebligas pli grandnombrian partoprenon en la studoj.

Komencjaro	Partoprenantoj	Nombro da landoj kaj ilia kodo
1998+99+00	8+4+4	8: BE, CZ, DE, GB, MA, PL, SE, USA
2002	22	12: AT, BE, DE, FI, FR, HR, IR, HU, LT, PL, RU, SE
2005	25	13: DE, FR, HR, HU, IR, IT, JP, LT, SK, SI, PL, RU, UKR
2008	12	8: BR, FR, GR, HR, IR, KR, UKR, USA

2011	21	11: BR, CH, DE, ES, FR, HU, IT, PL, RU, UKR, USA
2014	26	14: BR, ES, PL, SE, GB, BE, NL/RS, CZ, SK, HR, RU, HU, IR, CD (Kongo)
2017	20	12: BR, CH, CN, DE, ES, FR, KR, KZ, PL, RU, TR, US

La kursoj havis **riĉan programon** (16-20.09.2017): prof. Humphrey TONKIN gvidis la kurson pri Esperanta kulturo, prezentante ĝin kontraŭ la vasta historia fono; kontribuis prof. Aleksander MELNIKOV pri rilatoj inter lingvo kaj kulturo kaj pri la personeco de esperantisto; krome d-ro Jukka PIETILÄINEN pri Esperantaj revuoj. Same Humphrey TONKIN enkondukis la Esperantan literaturon de la unua periodo koncentriĝante pri la poezio, sekvis lin Tomasz CHMIELIK kun la prozo de tiu epoko. Eblas aliri fonetikon samtempe interese kaj serioze – tion pruvis prof. Nicolau DOLS SALAS per sia kurso. Interlingvistiko (en pli malvasta senco) konsistigis la kurson de prof. Vera BARANDOVSKÁ-FRANK, kiu jam povis uzi la proveldonon de sia universitata lernolibro pri interlingvistiko. Tiu ĝojiga evento malfermas la serion de lernolibroj de la Studoj fontantan el la 20-jara sperto.

La **malnova grupo** kiu startis kiel rekorde granda, ankaŭ fine restis rekorda, ja 11 gestudentoj plenumis sian finekzamenon kun defendo de sia faklaboraĵo el la terenoj de lingvistiko (Karina OLIVEIRA el Brazilo, Bengt Olof ARADSON el Svedio kaj Arina OSIPOVA el Rusio), de interlingvistiko (Ida STRIA kaj Michał KOZICKI el Pollando), el lingvopedagogio (Felix JIMENEZ LOBO el Hispanio kaj André STAES el Belgio), de komunikado (Johan DERKS el Nederlando/Serbio) kaj de literaturo (Rafael ZERBETTO el Brazilo/Ĉinio, Fernando PITA el Brazilo kaj Xesus MOIÑOS PARDAVILA el Hispanio), aldone kiel la 12a Paweł FISCHER-KOTOWSKI el la antaŭa grupo.

Kiel kutime, la lingvopedagogia specialiĝo de la tria jaro (kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net) konsistigas la instruistan trejnadon al kiu eblas aparte aliĝi por akiri la instruistan diplomon de ILEI. Ĉi-foje tri partoprenantoj el Pollando (Krystyna WOROBIEJ, Markéta WILKUS kaj Mariusz HEBDZIŃSKI) kaj unu franco (Jean-Claude ROY) akiris ĝin post prezento de finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno.

La interlingvistikan sesion kompletigis la **4a Interlingvistika Simpozio** (21-22.09.2017) kun la temo: *Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de*

Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo kun la celo festi la Zamenhof-jaron kaj la 20-jariĝon de la Studoj. Ĝi estis malfermita por granda publiko kun la oficialaj lingvoj: Esperanto, la angla kaj pola. Ĉ. 80 partoprenantoj el diversaj landoj traktis lingvopolitikon, planlingvojn kaj lingvistikon, literaturon, la movadon kaj instruadon de Esperanto en 3 paralelaj sekcioj dum du tagoj; entute okazis 50 prelegoj.



Surfote: Ekzameno de Karina OLIVEIRA kun Nicolau DOLS SALAS, Ilona KOUTNY kaj Aleksander MELNIKOV

Ĵaŭde por la malfermo, la rektoro de UAM, prof. Andrzej LESICKI, sendis gratulleteron; persone esprimis sian altan taksadon por la 20-jaroj de la Interlingvistikaj Studoj prof. Maciej KARPIŃSKI, vicdekano de la Fakultato pri Moderna Filologio; Stefan MACGILL, vicprezidanto de UEA, salutis la simpozion en la nomo de UEA. La unua ĉefprelego – Humphrey TONKIN: *Esperanto: A Language Policy Assessment* (Esperanto: lingvopolitika taksado) – estis malfermita por kolegoj de la Lingvistika Instituto. Vera BARANDOVSKÁ-FRANK parolis kiel la dua pri la tereno de interlingvistiko kaj prezentis la proveldonon de sia libro pri interlingvistiko. Vendrede matene same okazis du ĉefprelegoj: Ilona KOUTNY, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, skizis la 20-jaran historion de la Studoj ligante ĝin al la 50-jara historio de la universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko, kiu komenciĝis per la Esperanto-fako de Budapeŝta Universitato

en 1966. Sabine FIEDLER per amuzaj ekzemploj ilustris kiel funkcias ŝercoj en Esperanto.

Ĵaŭde vespere okazis impona bankedo kun la partopreno de la malnovaj kaj novaj gestudentoj, instruistoj de la Studoj, prelegantoj de la Simpozio kaj gastoj ĉe bongusta verspermanĝo kaj muzika programo (kontribuis Zuzanna KORNICKA kaj la franca grupo *La Kompanoj*). La gvidanto de la Studoj dankis la instruistan stabon kaj ESF pro ilia kunlaboro, rememoris pri tiuj kiuj festas specialan naskiĝtagon en tiu ĉi jaro kaj pri la ĉi-jare forpasinta Zbigniew GALOR, kies kontribuo al la Studoj restas neforgesebla. Ŝi gratulis la gestudentojn, kiuj sukcese finis siajn studojn. Aliflanke Humphrey TONKIN kun Katalin KOVÁTS dankis ŝian ĝisnunan sindediĉan laboron. Semajnfine la kunesto daŭris dum la tradicia kultura festivalo Arkones, kun prelegoj, muziko, filmoj.

Bibliografio:

KOUTNY Ilona 2016: Esperantologio kaj formado de Esperanto-instruistoj en universitato. En: *Prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto*. Red. GROSJEAN, Mireille. ILEI 26-33.

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/dokumentoj.html>

KOUTNY Ilona: Loke kaj fake, internacie kaj home. Prof. István Szerdahelyi (1924-1987). En: *Internacia Pedagogia Revuo* 2009/3: 23-29. www.ilei.info/ipr/lpr093.pdf

Ideala solvo por komplika situacio

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

En Afriko ekzistas multaj lokaj lingvoj. Homoj uzas ilin ĉiutage por saluti, por demandi „Ĉu vi dormis bone?” kaj en similaj kutimaj situacioj. Do infanoj aŭdas ilin, uzas ilin, ili estas la denaska lingvo, la denaskaj lingvoj, de afrikaj infanoj. En la lernejo venas aŭ tiu lingvo aŭ la kolonia lingvo, franca aŭ angla aŭ portugala. Tio dependas de la Ŝtato. Plej ofte la instrulingvo estas la kolonia lingvo, en kiu troviĝas la fakaj lernolibroj kaj ĉiuj scioj.

Do imagu: la lernanto komencas frekventi la elementan lernejon uzante nekonatan lingvon. Ĉu konata, ĉu ne konata, mi klarigu. Kompreneble la kolonia lingvo aŭdiĝas ĉe radio kaj televido. Do la infanoj aŭdas ĝin. Ĉiuj komunikoj de la Ŝtato al la loĝantoj estas en tiu lingvo, tamen tio ne tuŝas la infanojn. Do tiu plonĝado en ne konatan lingvon en la lernejo estas malfacila paŝo. Ni aldonu, ke la skribmanieroj de la angla kaj la franca estas aparte

la lingvo skribiĝas ekzakte per unu litero aŭ signo, ĉiam per la sama. Estas fakto, ke tiuj lernantoj lernas facile kaj plie, ili kapablas helpi en la lernado de la franca al siaj gefratoj, kiuj ne havis la saman ŝancon. Tion la instruistoj povis konstati kaj ili raportis tion al mi.

Bedaŭrinde tiu alfabeto IFA ne ekzistis fine de la deknaŭa jarcento. Pro tio Zamenhof devis inventi ĉ, ĝ kaj aliajn signojn.

Freinet-pedagogio – Parto II

La teorio pri multifaceta praktiko

- El la teknikoj de la Freinet-pedagogio –

de Mónika MOLNÁR (Svislando/Hungario)

„Kiam metiisto havas malbone funkciantan atelieron kun eksmodaj maŝinoj, kiuj grincas kaj pene funkcias, li ne koleriĝas kontraŭ la maŝinoj, ne devigas ilin pli bone funkcii. Li ne insultas tiujn sciante, ke tio neniel helpus... Anstataŭ tio, li klopodas modernigi sian atelieron. Same, ankaŭ ni povas provi modernigi la ilojn de la Lernejo, plibonigi ĝiajn teknikojn por iom-post-iome ŝanĝi la rilaton inter la Lernejo kaj la Vivo, inter la infanoj kaj la instruistoj adaptante aŭ readaptante la Lernejon al sia ĉirkaŭaĵo por pli bona efiko de niaj investoj.” (C. Freinet)

La tradicia lernejo koncentriĝas sur la instruendan materialon kaj sur la programojn, kiuj difinas tiun ĉi materialon. La Freinet-pedagogio renversas tiun ĉi tendencon proponante lernejon, kiu la infanojn metas en la centron. La Freinet-pedagogio – kreita de Célestin FREINET kaj lia edzino, Elise FREINET – baziĝas grandparte sur la libera infana sinesprimado tra la tiel nomataj teknikoj, kiel la liberaj tekstoj, liberaj desegnoj, lerneja korespondado, presejo, lernanta ĵurnalo ktp.

Freinet mem neniam parolis pri „metodo”, sed pri „teknikoj”, ĉar la teknikoj evoluas kaj tiu ĉi aspekto ja tre gravis por li. Siatempo li listigis 28 teknikojn kaj konsilis eĉ la vicon laŭ kiu indas enkonduki ilin por transformi klason laŭ la t.n. labor-edukado. Por interesiĝantoj valoras trastudi tiujn teknikojn ne nur pro historia trarigardo, sed ankaŭ pro pli bona kompreno de la koncepto, sen forgesi, ke tiuj teknikoj ŝanĝiĝis jam en la tempo de Freinet mem, kelkaj aldoniĝis, aliaj forfalis. Esence gravas, ke ĝi ne estu iu rigida, malfleksigebla, devige sekvenda listo. Kiel diris Freinet: ne estas absolute necese praktiki samtempe ĉiujn tiujn teknikojn, multe pli gravas kompreni la logikon, kiu kunigas ilin.

Tiuj teknikoj ofte estas prezentataj sub diversaj ordigoj laŭ diversaj bezonoj. Unu el la plej trafaj prezentadoj – por pli bone komprenigi ĝuste tiun kunligan logikon – grupigas ilin en kvin grandajn grupojn:

- 1) La teknikoj de libera sinesprimado (ekz. liberaj tekstoj, desegno; debatoj; muzika, korpa, manlabora, teknika, matematika kreadoj ktp)

- 2) La teknikoj de komunikado (ekz. lerneaj korespondado, interŝanĝo, ĵurnalo; infanaj konferencoj, prelegetoj ktp)
- 3) La teknikoj de ĉirkaŭaĵ-analizado (ekz. klas-promenadoj; personaj enketoj; plantadoj; sciencaj eksperimentoj; aktualaj-analizadoj ktp)
- 4) La teknikoj de personecigado (ekz. memkorekteblaj ekzercoj; ordigitaj dokumentoj; labor-biblioteko ktp)
- 5) La teknikoj de organizado kaj de kunlabora, komunuma vivo (ekz. atelieroj; laborplanoj; taksadoj; atestiloj; lerneja konsilio ktp)

Ĉiuj tiuj teknikoj estas bone pripensitaj, prilaboritaj post atentaj observadoj de la infanoj kaj ĉiuj valorus detalan analizon. Tamen, pro manko de loko, ni priskribu nun nur unu el ili, kiu estas la lerneja korespondado. Tiu ĉi tekniko ne estas hazarde elektita, ja kiel aludite jam en la unua parto, ĝi ligas Esperanton rekte al la Freinet-pedagogio.



Freinet ekvidis en Esperanto eblojn, kiuj kongruis kun liaj principoj kaj teknikoj kaj pro tio li ekuzadis ĝin. Ĉu tio signifas, ke la teknikoj de Freinet ne estas liaj propraj teknikoj? La originaleco de Freinet ne tiom estas la propra-persona malkovro de novaj pedagogiaj teknikoj, sed la adapto kaj integrado de manieroj kaj teknikoj de aliaj pedagogoj, kiuj agis adekvate kun la valoroj defenditaj de

Freinet tra originalaj didaktikaj alproksimiĝoj. Do, Esperanto rolis kiel unu el tiuj teknikoj, ja ĝi portas en si mem (evidente krom sia propedeŭtika valoro) plurajn samajn celojn, kiujn enhavas ankaŭ la pedagogio de Freinet: transdono de toleremo, respekto, demokratio, kunlaboro ktp.

Rilate al la lingvoj Freinet diris: „Oni lernas lingvon ne por koni, sed por uzi ĝin.” „La ĉefa elemento, la motivado, kiu estas la motoro de nia pedagogio, restas la plej grava ankaŭ ĉi-terene.” Sekvante la gvidlinion, la bazojn kaj la principojn de la Freinet-pedagogio koncerne la lingvojn, oni ne devus instrui ilin kiel lernobjektojn, sed uzi ilin tiom vivproksime, kiom tio eblas. Unu eblo por tio – el pluraj – estas la lerneja korespondado.



Sendepende de diversaj kondiĉoj, natura lernado per korespondado estas ĉiam:

- natura lern-metodo por la legado kaj la skribado de leteroj
- preparo por pensi kaj esprimi sin en alia lingvo
- natura motivado por diversaj kreadoj
- riĉa fonto de konsciiĝo pri aliaj personoj kaj kulturoj
- malfermiĝo al la mondo ktp.

Laŭ Freinet: „La korespondado kun geografie pli-malpli malproksima alia klaso estas malfermiĝo de la lernejo al senfine riĉa ekstero. Tiu ĉi (la korespondado) permesas unuavice motivadi la skribadon, la legadon, la desegnadon. Tiu ĉi konkrete malkovrigas aliajn vivmanierojn, aliajn geografiajn kaj kulturajn aspektojn. Tiu ĉi kreas interesojn kaj celojn. Tiu ĉi ebligas akiri publikon kaj interagantojn por ĉiuspecaj kreadoj. La infanoj povas dividi kun siaj korespondantoj esplorojn, malkovrojn, legaĵojn. Ĝi havas ankaŭ emocian flankon, ĉar la korespondado okazas de klaso al klaso, sed ankaŭ de infano al infano: ĉiu havas sian korespond-partneron. Se oni sukcesas trovi la bazajn monrimedojn, oni eĉ povas vojaĝi malpli koste, ja ĉiu infano loĝos ĉe sia korespondanto.” Ĉi-lasta aspekto – bedaŭrinde – ne ĉiam estas realigebla, ja ĉefe pere de Esperanto oni povas krei kontaktojn kun vere tre foraj infanoj kaj jam nur la vojaĝ-bileto estus sufiĉe kosta.

Sed kial elekti Esperanton kaj ne iun alian lingvon, se ni volas profiti (fakte profitigi la lernantojn) de la avantaĝoj de la korespondado en alia



lingvo ol la nia (kiu ĉe Freinet estis la franca)? Laŭ C. Piron, svisa psikologo kaj tradukisto-protokolisto ĉe UN: „Transiri el la franca rekten al alia nacia lingvo estas transiri el iu tre kompleksa, rigida kaj arbitra sistemo al alia tre kompleksa, same rigida kaj arbitra sistemo ... estas neglekto de tre grava etapo, kiu estas la «elkodigo».” Kompreneble lia aserto validas ne nur por la franca, sed por iu ajn nacia lingvo. Laŭ H. Frank, germana universitata instruisto kaj esploristo: „La lernado de Esperanto bezonas malpli da tempo

ol kiom ĝi gajnigos por la lernado de aliaj fremdaj lingvoj, kiu gajno povas esti 20-50%-a laŭ la diversaj lingvoj.” Tiun diron subtenas pluraj, diverslande realigitaj lernejaj eksperimentoj.



Freinet metis grandan akcenton sur la komunikadon. La lerneja korespondado oferdonas tre impresan pedagogian kaj interkulturan malfermon. Ene de ĝi la infanoj kreas, skribas, desegnas, legas, malkovras novaĵojn kune kun siaj alilokaj „samsortanoj”. Kreiĝas sentimentaj ligoj inter la diversaj gelernantoj kaj interŝanĝiĝas eksperimentoj, malkovroj.



Apud la pozitivaj pedagogiaj rezultoj de la lerneja korespondado estas ne-neglektendaj ankaŭ la moralaj rezultoj. La internaciaj korespondadoj, vekante interesiĝon pri aliaj landoj, popoloj, kutimoj ktp., malfermas ne nur la spiriton, sed ankaŭ la koron. Estas malprobable, ke infano, kiu dum 2-3 jaroj praktikis entuziasme, kun intereso korespondadon kun alilandaj infanoj, fariĝu junulo facile envolvebla en mensogajn, rasismajn agadojn, propagandojn sen konsidero pri homaj valoroj, sen provo serĉi la veron pli profunde. Pripensante la diversajn avantaĝojn, kiujn oferdonas la korespondado, tiu ĉi lasta en nia nuntempa – foje sufiĉe tempesta – mondo estas

vera sociala atuto. Legante la romanon „La eta princo” de Saint-Exupéry, oni facile eksuspektas, ke eble tiu tendenco eĉ ne estas tiom lastatempa aĉaĵo? „La homoj ne plu havas tempon por ion ajn koni. Ili aĉetas tute pretajn objektojn ĉe vendistoj. Sed, ĉar amikvendistoj ne ekzistas, homoj ne plu havas amikojn.” Korespondado povas konduki al valoraj amikecoj, sed eĉ se ne nepre, almenaŭ la pensmaniero de la korespondanto havis eblon laŭiri vojon en bonan direkton, kiu povas influi la personecon pozitive.

Ĉu estas facila nia lingvo Esperanto?

de Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio)

Ŝajnas, ke la demando en la titolo estas naiva: ĉu ne ĉiuj scias, certas, konvinkitas, ke ĝi estas la plej facila el ĉiuj homaj lingvoj? Ankaŭ mi tiel pensis; sed multjara sperto de instruisto pri Esperanto pli kaj pli konvinkas min pri la malo: en tio, ke ne ekzistas facilaj lingvoj, ke ĉiu lingvo facilas aŭ malfacilas laŭ sia propra maniero, kaj tio, kio ŝajnas esti facila por unu persono, tute malfacilas por alia. Oni supozas, ke la ĉefa avantaĝo de Esperanto estas la facileco de ĝia gramatiko. Sed... ĉu ĝuste gramatiko estas la plej grava el ĉiuj obstakloj dum lernado de iu lingvo?

Kiel konate, ekzistas du diversaj tipoj de homa menso: unu estas dominata de la dekstra cerba hemisfero, la alia de la maldekstra. De tio dependas logika aŭ imagema direkto de la menso. Kaj la facila strukturo de nia lingvo estas alloga precipe por logikemuloj. Ĝuste por ili estas ĝojo, de unua fojo ekkompreni la kernon de nia lingvo: ĝian senliman esprimeblecon, konsistantan en „kubeta sistemo”, kiam afiksoj kaj radikoj libere kunmetiĝas laŭ deziro de l’ parolanto. Kaj la strikta sistemo de vortfinaĵoj de unu flanko ordigas tiun kubaron, sed de alia ankoraŭ plivastigas, multifacetigas ĝin.

„Kreokapablo de la lingvo”, uzado de ĝiaj ebloj surbaze de la klare komprenataj reguloj – jen estas genia ideo de Zamenhof, kaj nun ĝi estas unu el la ĉefaj allogaĵoj por lernado de Esperanto. Sed tio ĉi allogas, kiel mi diris, nur homojn logikemajn, raciemanajn, por kiuj la ĝuo estas KOMPRENI, kaj krei mem laŭ la komprenitaj reguloj. Do, nia lingvo, estante racia, verŝajne, estas destinita nur por raciemanaj homoj? Ja tute ne; ni ĉiuj scias, ke ĉe ni abundas individuoj de ambaŭ tipoj.

Famas la kluboj, kie artemaj personoj instruas la lingvon al same artemaj personoj, kantante kaj teatrumante kun ili. Tiam oni ne memorfiksis logikan ĉenon, sed perceptas la vivantan lingvon, kun ĉiuj vortnodoj kaj esprimoj, jam pretan frazon, belstilan kaj belsonan. Oni influas ne racion, sed sentojn de homoj, kiuj estas gvidataj ĝuste per sentoj – kaj la pedagogia efiko estas senriproĉa.

Homoj kun domino de la dekstra hemisfero perceptas la mondon en imagoj, en fenomenoj, en ĉi-momento, sed ne en evoluo. Por ili estas pli facile ellerni 100 apartajn vortojn aŭ esprimojn, ol ekposedi nur 10 da ili plus la regulon, kiel produkti aliajn 90 el tiuj 10. Ĝuste tial sufiĉe multaj personoj povas sur iel-tiel kontentiga nivelo ekposedi la anglan, kun ĝiaj sennombraj ekskludoj; - sed ja ĉiuj tiuj ekskludoj jam estas indikitaj, oni ne devas PENSI kaj KOMPRENI – nur memorfiksi la jam preskribitan! Klare, ke por tiaj homoj facileco de nia lingvo tute ne estas evidenta. Tial ne povas ekzisti unusola metodo por instrui Esperanton al ĉiuj. Laŭ mia opinio, por havi bonajn rezultojn en instruado, oni devus dekomence kontroli la ecojn de la lernantoj per la plej facilaj metodoj. Ekzemple, homoj kun domino de la dekstra cerba hemisfero, se petataj kruci la brakojn surbruste, kutime maldekstran brakon metas supren.

Se ekzistas eblo, oni povas uzi ankaŭ pli komplikajn kontrolilojn, kaj poste, laŭ iliaj rezultoj, dividi sian grupon kaj apliki al ĉiu areto ĝuste tiun metodikon, kiun ili bezonas. Instrui logike al logikemuloj kaj sense al sensemuloj (per ludoj, kantoj, teatraĵetoj). Tio ŝajnas esti malŝparo de fortoj por la instruisto, sed la rezultoj de tia „homkongrua” instruado estos multoble pli sukcesaj, ol se oni aplikos unusaman metodikon al plej diversaj individuecoj! Ĉu fortoj de la instruisto ne multobliĝas, se li vidas la fruktodonecon de sia laboro? Ĉu la celo de instruisto ne estas elformi LINGVOPOSEDANTON? Homon, kiu ĜOJOS pro sia kono de la lingvo, kaj tial volonte uzas ĝin? Do, kreu ni kontentajn homojn, feliĉajn homojn, kaj tial Esperanto prosperos en la estonteco ☺.

Mi komprenas, certe, ke la instruisto mem posedas sian propran individuecon, kaj li/ŝi povas agi nur laŭ sia propra naturo; kaj ke lernantojn allogas ne nur la lingvo, sed, eble ĉefe, la personeco de la instruisto. Kaj lernantoj de iu instruisto havas ion komunan inter si mem kaj iamaniere similas al la instruisto, ĉar ili dividas kun li liajn ideojn, liajn inklinojn kaj kredojn – aliokaze kial ili restu liaj gelernantoj, se nenio el tio, kion proklamas la instruisto, interesas kaj allogas ilin? Tio estas absolute klara fenomeno ĝuste en instruado de Esperanto, nedeviga kaj ŝajne nebezona

objekto, kiu „estas lernigata nur per iuj specialaj rilatoj inter proponanto kaj ricevanto de tiel specifa aĵo, kiel internacia lingvo”.

Eble, en la epoko de Interreta studado rezonadoj pri la rolo de instruisto sonas ridinde: pri kiu klubo, kurso kun maksimume kelkdek personoj oni arogas paroli, se rete lernas dekmiloj? Sed komparu ni la rendimenton, efektivecon de ambaŭ tipoj: ĉu egalas, kiam restas unu lernanto el 20, kaj unu el 2000? Kiom ajn la mondo penas senigi nin de ajnaj homaj, interhomaj rilatoj, tamen ili persistas... kaj ofte ĝuste en Esperanto-klubo. La plej saĝa solvo de preskaŭ ĉiuj problemoj estas: ne „aŭ...aŭ” , sed „kaj...kaj”. En la reto ekzistas bonegaj instruiloj por ĉies gusto. Oni ĉerpu libere kaj plenmane, ankaŭ por modesta hom-al-homa instruado. Kaj rilate al diversaj tipoj de instruado, mi devas diri, ke mi tute ne alvokas niajn geinstruistojn spliti sian personecon kaj agi kontraŭ sia propra personeco, sed proponas, male, ke ili kredu al si mem kaj ne obeu al unusola „ĉionkonkera” metodiko, sed disvolvu siajn proprajn eblojn. Ja „homkongrua” pedagogio devas kongrui ne nur kun instruataj, sed ankaŭ kun instruantaj!

Se plej diversaj instruistoj produktos plej diversajn esperantistojn, tiam Esperanto, eble, „ĝisvivos ĝis la 2020-a jaro”, kaj ne restos nur bizara hobbio de malvasta kaj maljuna grupeto. Esperanto donis feliĉon al nia vivo; kial ĝi ne prilumigu ankaŭ la vivon de niaj genepoj?

Noto de Mireille GROSJEAN: Claude PIRON, psikologo, kutimis klarigi, ke okaze de lernado kaj uzado de Esperanto, la du hemisferoj de la cerbo, unu logikema, la alia kreema, laboras en plej vasta harmonio, kaj ke tio donas apartan ĝojon, plezuron, al la lingvouzanto.

La universitato povas funkcii alimaniere

Vicente MANZANO-ARRONDO (Hispanio), vmanzano@us.es

La universitato vivas en malfacila tempo. Pro la ekonomia integrisma tutmondigo, preskaŭ ĉiuj universitatoj de la mondo elektadas konduiti laŭ la fabrika modelo. Ili devas produkti sciencajn artikolojn uzante la anglan lingvon. Ili devas produkti utilaĵojn por la produktantaj agantoj. Ili devas atingi multe da mono por fari multekostajn projektojn, pri kiuj oni ne scias por kio ili utilas. Ili devas produkti diplomitojn, kiuj devas plene uzi la anglan kaj akumuli multekostajn kursojn por serĉi postenojn en la agresema labora

tutmondo. Kaj la universitatoj devas senripoze montradi, ke ili meritas ricevi la provizoran verdikton „senkulpa”. Pro tio, hodiaŭ la universitato estas batalkampo; ĝiaj membroj estas batalistoj unu kontraŭ aliaj; kaj ĉiuj devas montri, ke eble li aŭ ŝi estas la plej bona. La realo ne laŭlitere estas tia. Sed tio estas la celo de la konkurema fabrika modelo. Multaj homoj ne sekvas ĝin, eĉ iuj klopodas anstataŭigi ĝin serĉante la universitaton, kiu helpos plibonigi la mondon per koniloj. Sed la plimulto elektas la modelon pensante „alternativo ne ekzistas kaj mi ne estas heroo”. Preskaŭ ĉiuj el ili finfine grandigas la perdintaron, ĉar nur kelkaj povas esti la elektitaj. Ĉi tiu sistemo estas la sama por la institucia nivelo kaj ankaŭ por la landoj, kies universitatoj ludas la ludon.

La priskribo estas deprima. Mi pensas tiel, sed ankaŭ ion pli. Paŭlo FREIRE (*vidu IPR 2016/4 p.29*) diris proksimume „La aĵoj ne estas, la aĵoj estas estantaj; ni estas skribantaj tiun mondon sed ni povus esti skribantaj alian; ni estas historiaj uloj”. Pro tio, loka grupeto de universitatoj renkontiĝis antaŭ nelonge, fakte en novembro 2016 por helpi ŝanĝi la situacion. Ni esploras pri akademia subpremado kaj liberigo, lingva justeco, malfermita softvaro kaj similaj aferoj. La grupeto estis formita de kvar studentoj de psikologio, tri profesoroj de diversaj fakoj kaj unu ano de la administrado. Ni volis fari nerapidan kaj plezurigan ŝanĝon, montrante ke oni povas konstrui universitaton alimaniere. Por tio, ni grupiĝis en ĉi tiu jaro 2017 (ni ankoraŭ estas konstruataj) kaj komencis fari kelkajn agadojn. La antaŭlasta el ili estis enketo inter preskaŭ 400 studentoj pri la kondiĉoj kaj la sintenoj ĉirkaŭ la angla kaj Esperanto, kaj pri la varbadpovo de mallonga teksto, kiu prezentas la lingvon. La rezultoj estas tre utilaj por plibonigi niajn estontajn agadojn. La lasta ago estis seminario en la 21a de aprilo ĉe la Fakultato de Edukado de la Universitato de Seviljo (Hispanio). Ni atingis apogon de nia institucio uzante la kutimajn ilojn por tio. Kaj ni sukcese klopodis ankaŭ, ke la studenta ĉeestontaro povu atingi senkostajn kreditojn. Dum la dek horoj de la agado, ni faris prelegojn pri Esperanto, universala strukturo, lingva justeco kaj universitata subpremado; ni montris rezultojn de niaj teoriaj kaj empiriaj esploradoj; kaj ni faris trihoran atelieron. La rezultoj estas tre informoplenaj. Post tiu seminario, ni grandigis la varbadan grupeton kaj desegnas ambician agadon por la tuta sekva universitata jaro.

Oni povas esperi, ke malplimulta parto el la studentaro rapide aliĝos al niaj proponoj. Sed ne okazos sammaniere rilate al la profesorado. Mi bone konas miajn universitatajn kolegojn. Ili enmetas informojn en sian menson, sed diras nenion dum longa tempo. Poste, ili komencas digesti ĉion kaj

bezoni respondojn. Kelkaj el ili alvenos al mia laborĉambro por scii pri „tiu senutila afero” per malproksima sinteno; pluraj el ili konas mian laboron rilate al la universitata subpremado kaj miajn sciencajn artikolojn pri la fabrika modelo (verkitaj hispane). Ili bezonas multe da tempo por rimarki, ke alia universitato eblas kaj ili povas esti ŝanĝagantoj sen kariere morti dum la vojo. Por tio, ni bezonas vin. Nur kiam niaj kolegoj vidas aliajn profesorojn el la mondo, kiuj uzas „tiun senutilan aferon”, ili komencos pensi alimaniere. Laŭ ili, nur la fabrika modelo ekzistas, kaj ni devas kompreni, ke neniam estas la tempo de herooj. Ni, la sevila universitata grupeto, havas energion, ideojn, kialojn, emociojn, sukceson kaj jam sperton. Ni povas labori solaj, kaj faros tiel. Sed se la aktivulaj universitataj esperantistoj el la mondo konstruus reton...

El la landoj kaj sekcioj...

Belgio

La 10-an de majo delegacio de FEL kaj ILEI renkontis reprezentantojn de ĉiuj kupoloj pri instruado en Flandrio por paroli pri Esperanto kiel pedagogia instrumento pri instruado. Komence de 2016 la Flandra ministrino pri instruado, Hilde CREVITS, lanĉis publikan debaton pri la finaj lernoceloj de instruado (= kion la lernantoj devas scii post la fino de la elementa instruado aŭ mezlernejo).



Leo DE COOMAN kaj Dan VAN HERPE tre aktivis. En majo 2016 Dan VAN HERPE kaj Nicky JANSSEN, sekretariino de FEL, havis kontaktojn kun Flandraj parlamentanoj. Ili ricevis la broŝuron de Edward SYMOENS „La sociopolitika, pedagogia kaj kultura valoro de Esperanto” (en la nederlanda). Kathleen HELSEN, prezidantino de la Flandra Konsilaro pri Instruado, reagis kaj finfine estis renkonto la 10an de majo 2017. Dan VAN HERPE, André STAES, Kristin TYTGAT kaj Yves NEVELSTEEN estis la esperantistoj. Estis krom Kathleen HELSEN ankaŭ reprezentantoj de la Katolika instruado en Flandrio, la ĉefkonsilanto de la mezlernejoj de la Instruado de la Flandra Komunumo, reprezentanto de la

malgrandaj novaj lernejoj kiel Steiner, reprezentanto de la Katolika Universitato de Leuven kaj reprezentanto de la Flandra Instruada Konsilio. André STAES studas Interlingvistikon en Poznano kaj faris nederlandlingvan tradukon pri la finverko „Lingvaj eksperimentoj de la lastaj 100 jaroj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, ĉefe por la instruado de lingvoj”. FEL preparis mapon kun *Monato* kaj oni disdonis ĝin kune kun la libretoj de Helmar FRANK, Edward SYMOENS kaj Angela TELLIER.

Marc CUFFEZ

Ĉinio

Voĉlegado por Zamenhof-jaro

La 19-an kaj 20-an de oktobro, en la elementa lernejo Baotalu de Zhenjiang-urbo, Jiangsu provinco, Ĉinio, okazis filmprezendo de la internacia konkurso de mallongaj filmoj pri „Teo kaj Amo” kaj legado por „Zamenhof-Jaro”. La premiitoj el Ĉinio, Rusio, Ĉeĥio, Usono kaj Slovakio kaj 200 instruistoj kaj gelernantoj de lokaj elementaj lernejoj partoprenis en la aktiveco. Ĵaŭde, kvar el la premiitaj filmoj taŭgaj por infanoj prezentiĝis. Ili estas „Teo ligas avon kaj nepon” (Tianjin-a Esperanto-Asocio), „Mi soifas” (Germanio, Svedio), „Granda Knabo” (Rusio) kaj „Patrino” (Ĉeĥio, Ĉinio kaj Slovakio).



Vendrede okazis la aktivado por legado en la elementa lernejo Baotalu. Geknaboj voĉlegis poemojn kaj prozaĵojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto.

La geknaboj de la lerneja EO-societo voĉlegis „Aŭtuno venas”, „En la domo”, „La homo kaj la sezonoj”, „Amika rondo”. Iu knabo rakontis antikvan francan rakonton „La fosilo”. La Esperanta prononco de la geknaboj

estis laŭdata de famaj kaj veteranaj esperantistoj, kiuj venis de Ĉina Radio internacia, kaj de s-ino GONG Xiaofeng (Arko), vicprezidentino de ILEI. Ili diris, ke le geknaboj eĉ pli bone prononcas ol iuj plenkreskuloj. La rusa premiitino Olga SHILIAEVA diris, ke ilia prezentado estas ĝojige surpriza. Ŝi invitis ilin veni al Rusio kaj interŝanĝi opiniojn kun lokaj esperantistoj.

La elementa lernejo Baotalu estas malnova lernejo kun historio ligita kun Esperanto. Tiel frue kiel en la tridekaj jaroj de la lasta jarcento s-ro Fu

Naowu, unu el la pioniroj de la ĉina Esperanta Movado jam organizis kaj gvidis en la lernejo Esperantan grupon, kies aktivado havis gravan influon kaj faris akceladon al la disvolviĝo de la Esperanta movado de Ĉinio. La geesperantistoj de la lernejo jam partoprenis plurfoje enlandajn kaj internaciajn Esperantajn kongresojn, kaj havis renkontiĝojn kun alilandaj esperantistoj. Oni ankaŭ konstante kontaktiĝis kun eksterlandaj esperantistoj per interreto; unu el la instruistinoj de la lernejo eĉ ricevis la urban honor-medalon de la franca urbo Moutiers, kaj plie, du jarojn post tio, la Esperanto-societo de la lernejo ricevis la urban honor-medalon de la franca urbo Fontaine. La Esperanto-societo ankaŭ estis honore elektita kiel unu el elstaraj societoj de nia urbo kaj gajnis la unuan premion.

Ĉi tiu serio da agadoj riĉigas la postlecionhoran vivon de la geknaboj kaj plifortigas ilian memfidon pri la lernado. Kiel s-ro WANG Chongfang, la fama esperantisto, tradukisto, kompilisto de la Ĉina-Esperanta kaj Esperanta-Ĉina vortaroj, diris, „Se ellerni unu fremdan lingvon signifas malfermi fenestron, tiam ellerninte Esperanton, vi jam malfermis ĉiujn fenestrojn, tra kiuj vi povas vidi la tutan mondon.” La Filmprezendado pri Teo kaj Amo kaj la legado por „Zamenhof-Jaro” certe puŝos la Esperantan agadon de la lernejo pli antaŭen.

Pere de Esperanto, kun teo en la maldekstra mano kaj kun amo en la dekstra, la geknaboj vivu en feliĉo!



SHI Xueqin (Neĝeta)

Germanio

SALO en la valo: La 12-a Somera Arbara Lernejo por ĝemelurbaj gelernantoj el Herzberg (DE) kaj Góra (PL) organizita en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Gelernantoj el ambaŭ urboj kun siaj instruistinoj pasigis en la somero 2017 unu semajnon kune en Sieber, urboparto de Herzberg en la suda parto de la Harz-montaro, en la valo de la rivero Sieber. Tia Somera Arbara Lernejo estis organizita nun la 12-an fojon en sinsekvo kaj ĝi proponis al la partoprenantoj ludhavan lernadon de Esperanto sub la gvido de Zsófia KÓRÓDY kaj Michaela STEGMAIER. La gelernantoj estis dividitaj en du grupojn laŭ la niveloj de lingvaj kapabloj: kelkaj estis spertaj lingvouzantoj, ĉar ili jam lernis Esperanton de kelkaj jaroj en sia lernejo kaj partoprenis en someraj lernejoj en la antaŭaj jaroj.



Aliaj estis komencintoj, do havis nur iom da antaŭscio pri Esperanto, sed dum la semajno, dank' al la intensa lernado dum ĉ. 4-5 horoj en ĉiu tago, ankaŭ ili rapide progresis. La taga programskemo montris la kutiman ritmon: la antaŭtagmezajn Esperanto-lecionojn sekvis posttagmezaj libertempaj aktivajoj – sed ankaŭ tiuj okazis kun lingva ekzercado. Ĉiuj multe lernis, sportis, naĝis, ekskursis en la montaro, babilis, kantis kaj bone amuziĝis.

La 12-a SALO tamen estis iom alia, ol la antaŭaj. Unue, ĉar la ĉeforganizantino fariĝis Michaela, kiu pro siaj antaŭaj spertoj, kiel ofta SALO-partopreninto, nun jam fariĝis gvidantino kaj elpensinto de lernmaterialoj kaj ludoj por la 12-16-jaraj kursanoj. Ŝi kaj kelkaj aliaj germanaj gejunuloj estas membroj ankaŭ en la skolta movado, do facile venis la ideo kombini la du aferojn kaj konstrui la SALO-programon surbaze de skoltaj virtoj kaj kutimoj.

En mia raporto mi metas kelkajn interesaĵojn en la fokuson. Eble ili servos ankaŭ kiel ideo-banko, uzebla modelo por aliaj gekolegoj.

Sinprezenta formularo

Kelkajn semajnojn antaŭ la renkontiĝo ĉiuj partoprenontoj ricevis formularon, per kiu ili devis sin prezenti, aldoni personajn datojn kaj foton, mencii hobiajn, ŝatojn kaj malŝatojn, priskribi talenton kaj kapablojn. Ili estis senditaj al la instruistoj kaj tiel ĉiuj ne nur lernis, kiel sin prezenti, sed oni povis lerni unu pri la aliaj jam antaŭ la alveno.

Helpiloj

Helpiloj por SALO-12 estis la titolo de 12-paĝa memverkita broŝuro, kiun ĉiu lernanto ricevis post la alveno. Ĝi enhavis utilajn vortojn por ĉiutagaĵoj kaj komprenado de instrukcioj, formularon por interkona bingo-ludo, kantojn por komuna kantado, langrompilojn, informojn pri skoltoj kaj priskribon de la t.n. insignoj, kiujn oni devis kolekti dum la semajno.

Insignoj

La insignoj estis etaj glumarkoj kun grafikaĵo, simbolo, kiu montris la plenumendajn taskojn, kiuj similis al kutimaj farendaĵoj ekz. en skoltaj tendaroj. Jen kelkaj bildetoj kun la signifo: ŝuo=trifoje partopreni en matena kurado, plumo=lerni min. 10 birdnomojn, manĝiloj=deĵori, helpi en la kuirejo por prepari matenmanĝon ktp. Tiuj insignoj, etaj instigiloj fariĝis tre popularaj, ja ekestis konkurso por kolekti ilin, ĉar post akiro ili estis gladiĝitaj sur la verdajn koltukojn, kiujn ĉiu partoprenanto ricevis. Ju pli da insignoj, des pli bunta kaj alloga la koltuko fariĝis. La lernantoj ofte kalkulis, kiom da glumarkoj ili jam ricevis kaj fieris pri la atingitaj rezultoj.

Nigra teatro

Unu el la plej memorindaj eventoj estis la Teatro-tago. Kun helpo de invitita specialistino pri t.n. nigra teatro la lernantoj dum la tago pretigis siajn kostumojn, akcesoraĵojn kaj la scenejon por la vespera prezentado.

Ili mem kreis koreografion, elpensis etajn scenojn, ekzercis sin pri movoj, dancoj, akrobataĵoj, kies prezentado en ultraviola lumo kaj kun taŭga muziko kreis magian efikon kaj ravis la publikon.

Inter la spektantoj estis ankaŭ loĝantoj el Sieber, alvenintaj gepatroj, geamikoj kaj eĉ Lutz PETERS, urbestro de Herzberg. Estis mirinde, kiom rapide la gelernantoj sukcesis ne nur krei la enhavon de la prezentaĵo sed harmonie kunagi sursceneje – kvazaŭ ili estus jam de longa tempo membroj de iu teatra grupo. La longa aplaŭdo kaj la laŭdoj, gratuloj vere ĝojigis ĉiujn.



Taglibro

La verkado de taglibro havas jam tradicion, ĝin ni pretigas dum ĉiu SALO. Individue, en paroj aŭ en grupetoj la partoprenantoj ĉiutage skribas pri la eventoj, pri siaj travivaĵoj, spertoj, sentoj, opinioj ktp. kaj la plej lertaj ankaŭ aldonas memorigajn ilustraĵojn, desegnaĵojn. Ili povas uzi sian gepatran lingvon kaj kompreneble ankaŭ Esperanton. Ĉi-jare – dank’ ankaŭ al la partopreno de pluraj pli spertaj SALO-anoj – multajn paĝojn ili verkis en la internacia lingvo. Tiuj taglibroj estas poste uzataj por raportado en ambaŭ urboj en la Esperanto-klubo, en la urbodomo, en lernejoj ktp., kaj partojn el ili ni sendas kiel aldonajon al la oficiala raportformularo de DPJW (*Deutsch-Polnisches Jugendwerk*), kiu partsume sponsoras junularajn renkontiĝojn inter Pollando kaj Germanio.

Urbodoma akcepto

La ĝemelurbaj gejunuloj estas konsiderataj kiel junaj delegitoj de sia urbo. Dum tiu semajno ili estas reprezentantoj de siaj lando, urbo, lernejo, kaj la gastiganta urbo aranĝas oficialan akcepton por la gastoj. Tiu 1-2-hora evento laŭ la tradicio okazas en la urbodomo kaj la urbestro (aŭ lia/ŝia komisiita anstataŭanto) akceptas la SALO-anojn. La programo enhavas komunan fotadon, informadon pri la urbo, ekonomio, politiko, interesaĵojn pri la ĉiutaga vivo, pri projektoj kaj planoj, sed povas okazi ankaŭ kvizo aŭ iu ludo, kantado, demandado, babilado.



Raportoj, fotoj pri SALO aperas sur la urba hejmpaĝo kaj de Herzberg kaj de Góra, en lokaj kaj regionaj gazetoj, kiel ekz. nun eĉ pluraj artikoloj en *Harzkurier*. Se vi interesiĝas pri pluaj detaloj, havas specialan demandon pri tiu sukcesa, regule organizita junulara renkontiĝo, ni volonte respondas, konsiliĝas kun gekolegoj.

Zsófia KÓRÓDY

Hungario



PONGRÁCZ Istvánné (1926-2017)

La 1-an de septembro 2017 forpasis nia koleginino PONGRÁCZ Istvánné. Ŝi instruis al 10-14-jaruloj la hungarajn lingvon kaj literaturon kaj la rusan lingvon. Esperanton ŝi lernis en la 1960-aj jaroj. Ekster la klasĉambro ŝi ne postulis gvidajn organizajn rolojn, sed ŝi akceptis labori en la urba pedagogia teamo de Szombathely, trapasi ekzamenon, partopreni metodikan kurson kaj instrui la lingvon.

Ŝian entuziasmon kaj sukceson inter la gelernantoj atestas, ke ekzemple en la 80-aj jaroj ŝi gvidis jarojn post jaroj plurajn fakrondojn, instruis Esperanton kiel libervole elekteblan lingvon, eĉ ekster la lernejaj muroj ŝi arigis infanojn por E-kurso en kulturdomo. Ankaŭ ŝia sindediĉa laboro

kaŝiĝas malantaŭ la statistikoj de tiu ora epoko, ja ŝi estis unu el la plurcent pedagogoj, dank' al kiuj fine de la 20-a jarcento en Hungario vasta publiko akiris konojn pri Esperanto kadre de oficiala instruado, de bazlernejoj ĝis universitatoj.

Japanio

Speciala somera programo kun Prof. Barboza

La 5an de aŭgusto, la japana ILEI-sekcio kunlabore kun la studeduka fako de Japana Esperanto-Instituto okazigis specialan programon kun brazila esperantisto Prof. Josias BARBOZA. Revenvoje al sia hejmo post la UK en Seulo, li vizitis Tokion. Profitante tiun ĉi okazon, ni planis tuttagan programon en la klasĉambro de JEI. Antaŭtagmeze, Barboza parolis pri la Esperanto-instruado kaj ĝenerala situacio en Brazilo. Kiel instruisto pri la portugala kaj la angla, li havas multe da spertoj ankaŭ en instruado de Esperanto kaj eldonis la lernolibron „ESPERANTO por lernejaj klasoj”, profesinivelan lernilon en 2008. Li diris, ke malgraŭ la favora enlanda kondiĉo por oficiale instrui Esperanton en lernejoj kaj la fakto, ke relative multaj brazilanoj studis en UAM, malofte estis E-lecionoj en universitatoj. Tio estis al mi iusence surpriza. Li multe parolis kaj ni multe demandis. Partoprenis 14 personoj. Posttagmeze, ni havis la okazon aktive partopreni en grupaj debatoj sub la gvido de Barboza.



La temoj de la debatoj estis la jenaj du: „Ĉu la moralo degeneris?” kaj „Po ĉiu homa rajto unu homa devo. Ĉu?” Ni apartiĝis en du grupoj kaj kun samnivelaj parolantoj de la lingvo, ni multe ekzercis nin pri parolkapablo kaj parolemo en grupa etoso. Tia aktivado malofte okazas en Japanio kaj ne ĉiuj kutimiĝas al debatado, tamen ni sufiĉe ĝuis la okazon. Barboza lerte gvidis la sesion, pro kio ni multe dankas lin. Inter 15 partoprenantoj estis kvar alilandanoj momente loĝantaj en Tokio kaj la filino de Barboza, kiu komencis lerni Esperanton nur antaŭ duonjaro.

ISIKAWA Tieko

Kroatio

Valora festivalo, kiu kunigis homojn kaj kulturojn

La unua Esperanta festivalo INTER-FEST okazis en Bjelovar de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017 kaj estis titolita: KULTURA KUNFANDIĜO DE LA MULTETNA EŬROPO.



Oni pritraktis ĝin per koncertoj, prelegoj, libroprezentoj, turismaj ekskursoj, filmoprojekcioj kaj ekspozicioj.

La okazigo de la internacia festivalo INTER-FEST, dediĉita al la 130-jariĝo de Esperanto kaj la centa datreveno de la forpaso de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de ĉi tiu internacia lingvo, estas grandaj honoro kaj ĝojo por la bela urbo Bjelovar, kiu la Esperantan tradicion gardas jam pli ol unu jarcenton.

Sabaton, la 5-an de aŭgusto, estis organizita ekskurso al Ĝurđevac, malnova urbo, kaj al ekspozicio de la fama kroata pentristo Ivan LACKOVIĆ. Poste okazis malfermo de la ekspozicioj *Mia unua alfabetlibro*, kaj infan-desegnaĵoj, *La flugiloj de fantazio*. Grava evento okazis posttagmeze: prezento de *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* de d-ro Jozo MAREVIĆ. La interkona vespero de la partoprenantoj estis en la Hotelo Central. Aliĝis 120 esperantistoj, sed alvenis ĉirkaŭ naŭdeko, kelkaj por unu aŭ du tagoj.

La dua tago estis dediĉita al koncertoj kaj prezento de libroj. Koncertis Neven MRZLEČKI el Kroatio, Mikaelo BRONŠTEJN el Rusujo kaj urbaj kaj regionaj kultur-artaj societoj. Ilia programo nomiĝis *Bjelovar per koro kantas*.

La trian tagon okazis ronda tablo pri la festivala temo, Deklamkonkurso por gejunuloj kaj plenkeskuloj, prezento de la Esperanta traduko *La nigra patrino, tero* de Kristian



NOVAK kaj internacia koncerto por bjelovaranoj kun la partopreno de Mikaelo BRONŠTEJN, Neven MRZLEČKI kaj la duopo Françoise-Dédé el Francio.

La kvaran tagon estis malfermo de pentraĵ-ekspozicio *Azia paletro* de la korea pentristo Ho Song, prezento de du bulgaraj libroj *Brakumi la mondon per Esperanto* kaj *La viro el la pasinteco*. Oni ankaŭ prezentis infanlibron de la israela aŭtorino Luiza Carol, *Tikiriki Tok el Strobilo*. Marija Jerković havis mallongan kurson *Ni lernu la kroatan*. La literaturan kunlaboron inter kroataj kaj polaj esperantistoj prezentis Tomasz Chmielik el Pollando. La kvaran tagon oni vizitis la naskiĝlokon de la kroata verkisto Mato Lovrak, kies libron *La trajno en la neĝo* UEA proklamis kiel Infanlibron de la jaro 2015. Poste la partoprenantoj ĝuis en la najbaraj naĝbasenoj.

La kvina kaj sesa tagoj estis dediĉitaj al ekskursoj: *Konatiĝu kun Kroatio*. Dum tiuj tagoj estis organizataj ekskursoj al la ĉefurbo Zagreb: la kvina tago

al Stubica kaj Kumrovec, la sesa al Varaždin kaj Trakošćan. La lasta tago estis Adiaŭa tago. INTER-FEST celas fariĝi rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos la praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon. INTER-FEST volas stimuli la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de EO en la kultura kampo. La unua festivalo certe tion atingis.

Marija JERKOVIĆ

Pri 499

Post diskuto inter Mirejo „onkline” kaj Henrik „nevo” (kadre de la programo Ekparolu de *edukado.net*) venis jena mesaĝo de Henrik al Mirejo (2017-06- 11)

Saluton Mirejo,

Mi nun serĉis pri Esperanto kaj la Dewey-Dekuma Klasifiko: mi trovis iom, sed ne multe. Ĉiuokaze, ĉi tie estas mallonga teksto pri la temo:

Dek unu jarojn antaŭ la Unua Libro de Doktoro Zamenhof, usona bibliotekisto, Melvil DEWEY, eldonis la 10-an de junio 1876 sian „Dewey Dekuman Klasifikon (DDK)” (*Dewey Decimal Classification (DDC)*), kiu estas verko tiel grava kiel la *Unua Libro*: ankoraŭ hodiaŭ la DDK estas la plej uzata sistemo por organizi la scion de la mondo; pli precize, por organizi la scion de bibliotekoj tra la mondo.

Kiel funkcias la DDK? La klasifiko uzas numerojn de 000 ĝis 999. Unue, la DDK havas dek ĉefajn kategoriojn:

000: *Ĝenerala*

500: *Naturscienco*

100: *Filozofio kaj Psikologio*

600: *Teknologio*

200: *Religio*

700: *Arto kaj Amuzaĵo*

300: *Sociaj Sciencoj*

800: *Literaturo*

400: *Lingvoj*

900: *Historio kaj Geografio*

Tiam, la sekvaj subdividoj dependas de la kategorio (ekzemple, 510 estas Matematiko, 520 Astronomio, 530 Fiziko, 540 Ĥemio ktp.). Nature, ni trovos Esperanton en la kategorio 400, sed kie precize?

400-409: *Ĝeneralaj verkoj pri lingvoj*

410-419: *Lingvosciencoj, kaj signolingvo (419)*

420-429: *Angla*

430-439: *Germana*

440-449: *Franca*

450-459: *Itala*
460-469: *Hispana kaj portugala*
470-479: *Latina*
480-489: *Greka*
490-499: *Aliaj lingvoj*

En la lasta subkategorio ni trovas ekzemple keltajn lingvojn (491), afrikajn lingvojn (496) kaj „Oceaniajn kaj diversajn lingvojn” (499). Kiam Amikumu lanĉiĝos por aliaj lingvoj, ĝi havos datumbazon en pli ol 7 800 lingvoj, ĉiu el kiuj troviĝas en ia subkategorio de la Dewey-Dekuma Klasifiko.

Mi ne havas la tutan liston, sed mi scias, ke la kategorio 499.442 estas por la Maoria lingvo (Nov-Zelando), kaj... Esperanto havas sian propran kategorion, kiu estas 499.992!

Nun, la kategorio 499.992 enhavas librojn pri Esperanto (vortaroj, lernolibroj ktp.). Se vi volas trovi novelojn en Esperanto, vi devas serĉi sub la kategorio 899.992 (800: Literaturo, 890: Aliaj literaturoj, 899: Literaturo de Oceanio kaj diversaj literaturoj). Kaj se vi volas trovi librojn pri alia temo, skribitajn en Esperanto, vi devas serĉi en la ĝusta kategorio. Do, ekz., vi trovos libron pri astronomio skribitan en Esperanto sub 520, kaj libron pri vojaĝo en Aŭstralio sub 919.4 ktp.

Nun, kiam mi serĉis librojn pri kaj en Esperanto en mia loka publika biblioteko, mi trovis ankaŭ kelkajn malnovajn librojn pri Esperanto sub la kategorio 408.92. Kial? Ĉar tiu kategorio traktas pri „Endanĝeritaj lingvoj”. Feliĉe, mi pensas, ke Esperanto ne plu estas kandidato por tiu kategorio.

Mi ne scias, kiam Esperanto estis aldonita en la kategorio 499, sed mi ne surpriziĝus, se estis antaŭ la jaro 1900. Ni bezonus demandi iu ajn spertan bibliotekiston...

Salutojn de Nov-Zelando, Henrik

Noto: Henrik HILLERSTRÖM estas „nevo” en la programo „Ekparolu!” de edukado.net. Li havis interparoladon kun Mirejo. Nun li jam fariĝas kontribuanto de IPR. Gratulojn al li!

Inter Don-Kiĥoto kaj Sanĉo Panzo

Cervanto, la grandulo de la hispana kulturo, kun siaj literaturaj herooj Don-Kiĥoto kaj Sanĉo Panzo titolpaĝe de ĉi tiu kajero alvokas partoprenontojn al la kongresoj de HEF kaj ILEI okazontaj inter la 20-a kaj 28-a de julio 2018 en Madrido. Ne hazarde ili. La revoj de Don-Kiĥoto, liaj streboj al noblaj idealoj kaj metafora batalo kontraŭ ventmueliloj, povas ankaŭ metafori la strebojn de esperantistaro al justa komunikado kaj kontraŭ la ventmueliloj de kultura hegemonio, inspiritajn de la *Interna ideo* kiel Don-Kiĥoton inspiris la idealigita amo al Dulsinea de Toboso. Kaj la pragmata Sanĉo Panzo metaforas la nepron, ke tiuj streboj ĉerpu la inspiron kaj energion el la realo de homara evoluo kaj realaj homaj bezonoj.



La Don-Kiĥota idealismo kaj Sanĉo-Panza pragmatismo, la finvenkismo kaj raŭmismo, la multlingvismo kaj nur-angla tutmondismo – jen antipodoj kiuj ne eblas unu sen la alia. Ĉu la vivo estas nur revo kaj ŝajno, kiel sugestas Don-Kiĥoto, aŭ ĝi estas firme ligita al la materia realo, kiel respondas Sanĉo Panzo? Ĉu la *Interna ideo* estas neatingebla gvidstelo de la esperantistoj, aŭ ĉu ilia praktika uzo kaj ĝuo de la *Internacia lingvo de D-ro Esperanto* povas reale plibonigi la mondan komunikordon? Hispanaj esperantistoj kaj esperantistaj pedagogoj de la tuta mondo dum siaj kunligitaj kongresoj en Madrido julie 2018 ne tro zorgos pri tiuj dilemoj. Ne forgesante la idealojn de esperantismo, ili koncentros sin al la reala kultura heredaĵo de Esperanto kaj aktuala kulturkreado en Esperanto.

La kongresejo

La antaŭe anoncita kongresejo en la studenta rezidejo „*Chaminade*” ne plu validas ĉar ĝia estraro ŝanĝis planojn por la somero 2018. LKK devis serĉi alian solvon ĉe studentaj rezidejoj de la universitato UCM (Universidad Complutense de Madrid). Post iom longa tempo venis oferto por kongresejo en la rezidejo *Colegio Mayor „Teresa de Jesús”* (<https://www.ucm.es/cm-teresa-de-jesus>) eĉ kun pli bonaj prezoj kaj kondiĉoj ol estis ĉe „*Chaminade*”. Tiuj ŝanĝoj prokrastigis kunmeton de la kongresa buĝeto kaj

kotiztabelo. Sekve la aliĝilo ne povis esti preta por ĉi tiu numero de IPR sen kaŭzi pli grandan malfruon de la revuo. La membraro kaj aliaj interesatoj ricevos la aliĝilon alivoje: rete, aŭ per la tradicia poŝto por tiuj kiuj ne uzas la reton.

La programo

Kiel ĉiujare, ankaŭ ĉi-foje aperos novaĵoj en la tradicia ILEI-kongresa programo. La plej granda programa novaĵo en Madrido estos du komunaj tagoj de la Hispana Kongreso de Esperanto kaj Kongreso de ILEI, riĉaj je kultura programo laŭ la tradicio de hispanaj E-kongresoj. La Simpozio pri la kongresa temo *La kultura heredaĵo de Esperanto* estos organizita kunlabore kun la universitato UCM.

Pliaj kaj pli konkretaj informoj aperos en kongresaj komunikoj, en la retejo *ilei.info* kaj en la venontaj numeroj de IPR.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri kongresoj de ILEI

ILEI-Kongresoj en 2019 kaj 2020

Konkurso

por elekto de invitantoj de kongresoj de ILEI en la jaroj 2019 kaj 2020

Laŭ la Konferenca Regularo (www.ilei.info/dok/Konferenca_regularo.pdf), la Estraro de ILEI invitas sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizaĵojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por:

- invitanto de la 52-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2019
- invitanto de la 53-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2020.

Organizaj postuloj

- La invitanto devas disponi sufiĉajn organizaĵajn fortojn por organizi la Kongreson kunlabore kun la Estraro de ILEI.
- La kongreso devas esti sendependa, sen konkurenco de aliaj eventoj.
- Financa mastrumado de la kongreso apartenas al ILEI. LKK dezirinde disponu enlandan bankkonton por faciligo de enlandaj pagoj.

- La Konferenca Regularo de ILEI estas deviga por ILEI kaj por la konresa invitanto.
- LKK laboras sub gvido de la estrarano pri kongresoj de ILEI kaj kune kun li/ŝi respondecas pri la kongresorganiza laboro al la Estraro de ILEI.

Kriterioj

La Estraro de ILEI taksos la kandidatojn kaj elektos kongresinvitontojn laŭ la jenaj kriterioj: organizaj fortoj kaj spertoj, taŭgeco, kostoj de la proponata kongresejo kun teknikaĵoj, loĝkostoj kaj komforto, atingeblo, proponata enhavo kaj proksimumaj kostoj de turisma kaj kultura programo, atendebla subteno de lokaj aŭtoritatoj kaj amaskomunikiloj, ŝancoj por gajni subvencion, atendeblaj efikoj al la lokaj E-movado kaj ekstermovada medio, kiom longe ILEI ne konferencis aŭ kongresis en la kandidata lando, facileco kaj kosto de veturo inter la Kongreso kaj UK se la ILEI-Kongreso okazos ĵus antaŭ aŭ tuj post UK.

Kiel konkursi?

Kandidatiĝan leteron, kun esprimita kaj motivita intenco inviti la kongreson, precizigante por kiu kongreso vi kandidatiĝas, ĉu en la jaro 2019 aŭ 2020, bonvolu sendi retpoŝte al la estrarano pri kongresoj: Radojica Petrović <radojica.petrovic.rs@gmail.com> , kopie al <ilei.sekretario@gmail.com> plej laste ĝis: 31 januaro 2018.

Bonvolu aldoni al la letero:

- Deklaron, ke vi akceptas la Konferencan Regularon de ILEI kaj subskribitan ekzempleron de la Regularo kiel ateston, ke vi respektos ĝin se via invito estos akceptita;
- Bazajn informojn laŭ la jena demandaro:
 1. Konkiza prezento de la organizaĵo/ILEI-sekcio, kiu kandidatiĝas por inviti la kongreson, ĝiaj organiza strukturo, adres- kaj kontakt-informoj, agadplanoj, agadrezultoj kaj motivoj por kandidatiĝi.
 2. Ĉu iam antaŭe okazis iu ILEI-aranĝo en via lando? Kiu, kiam?
 3. Prezento de ebla LKK: prezidanto, kasisto kaj aliaj.
 4. Kion kaj kiomkoston vi proponas por la kongresejo?
 5. Kiujn datojn vi proponas por la kongreso kaj kiel ĝi rilatus al aliaj E-eventoj, precipe al UK?
 6. Kian kaj kiomkoston (proksimume) loĝadon vi povos proponi?
 7. Kiaj estas veturebloj por alveno kaj foriro de kongresanoj?

8. Kian subtenon de la loka/landa E-movado kaj ne-movadaj institucioj vi povas certigi por la kongreso?
9. Kion, por orienti, vi proponas por la turisma kaj kultura programo?
10. Ĉu eblas peti subvencion por la kongreso aŭ iu ĝia programero?
11. Kiaj, kiutempaj, kiom longaj kaj kiom kostaj (proksimume) estas vojaĝebloj inter la proponata kongresurbo kaj okazejo de UK se la Kongreso okazos ĵus antaŭ aŭ tuj post UK?
12. Ĉu vi povas proponi antaŭkongresan aŭ postkongresan turisman kaj/aŭ fakan programon por kongresanoj kiuj dezirus viziti vian landon pli longe ol la kongressemajnon?

Limdatoj

Por la 52-a Kongreso en la jaro 2019

Ĝis 2018/02/28: Kandidatiĝoj

Ĝis 2018/04/15: Decido de la Estraro pri loko kaj datoj de la kongreso

En majo 2018: Vizito de la estrarano pri kongresoj kaj kunsido kun LKK en la kongresurbo

Ĝis 2018/06/30: Kongresaj buĝeto kaj programskizo, kontraktoj kun servodonantoj (kongresejo, hoteloj, ...), la una komuniko, informoj kaj varbiloj dissenditaj kaj -ataj

2018/07/21-28: Prezento de la kongres-urbo kaj -lando 2019 dum la 51-a Kongreso en Madrido; Startigo de la aliĝado

Por la 53-a Kongreso en la jaro 2020

Ĝis 2018/05/31: Kandidatiĝoj

Ĝis 2018/06/30: La Estraro aprobas rekomendojn al nova Estraro elektota en Madrido

2018/07/21-28: Transdono de la konkursa materialo kaj rekomendoj al la nova Estraro por plukonsidero kaj findecido. Prezento de la perspektivoj de ILEI-kongreso en 2020.

Pli detalan tekston de la konkurso kun aldonaĵoj eblas legi en kongrespaĝoj de ilei.info.

Por la Estraro,

Radojica PETROVIĈ, estrarano pri kongresoj

Dorskovrile: *La Madrida LKK bonvenigas vin. De maldekstre: Manolo Parra, Santos Olan, José Antonio del Barrio, Radojica Petroviĉ, Felix Lobo, Ricardo Biurrún kaj Águeda Biurrún González.*

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrola: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakia, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

Unesco (kun statuso de observanto): Repräsentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet**, **Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), 10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 30-an de novembro 2017,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2018.**



„Chaplin“ propagandis la libreton Poŝamiko dum UK en Buenos Aires. Legu la artikolon de Dennis Keefe pri silentaj filmoj sur p. 4.





La Madrida LKK bonvenigas vin